n-ro 42

oktobro 1993

ISSN 0941-9306

# La Merkato

La nova identecŝildaro estis sendita al la membroj komence de aŭgusto, el Ĉinio kaj Japanio por membroj el tiuj landoj, kaj el Litovio por la ceteraj membroj. Bonvolu averti RR se vi ne jam ricevis vian ekzempleron.

Por novaj membroj: se vi nun aliĝas, via kotizpago (400 belgaj frankoj, 10 usonaj dolaroj, 20 germanaj markoj, aŭ egalvaloro) validas de oktobro 1993 ĝis fino de 1994.

---

**Enhavo**

Anoncita aranĝo . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 3
Ĉina filio de IKEF ? . . . . . . . . . . . . . . . . . 3
Komercaj petoj kaj proponoj . . . . . . . . . . . . . . 4-5
Raportoj pri Universala Kongreso en Valencio . . . . . . 6-8
Eldono de fakaj libroj en Esperanto . . . . . . . . . . 9
Pri miraklaj manaĝeroj... . . . . . . . . . . . . . . . 10
Donacoj - novaj aliĝoj - adresŝanĝoj . . . . . . . . . . 11

**La Merkato (LM)** estas organo de IKEF. Ĝi aperas kvaronjare kaj servas al la membraro kiel komuna komunikilo.

**La Estraro de IKEF**: S-ro Franz Josef Braun (FJB), Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario; S-ro Roland Rotsaert (RR), Financa Konsilanto; D-ro István Gether, S-ro François-Xavier Gilbert (FXG); D-ro Marco Picasso; S-ro Seikô Yamasaki; S-ro Daniel König (dk).

**Revizoro por la financa raporto**: D-ro Gianfranco Polerani.

**Centra sidejo**: Ĉe s-ro Frans Josef Braun, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl, Germanio.

**Financa sidejo kaj membrara administrado**: Ĉe s-ro Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, B-8000 Brugge, Belgio, telefono+fakso: +32.(0)50.330004.

**Redaktora sidejo**: Ĉe s-ro Daniel König, Speyerer Str. 80,
D-68535 Neckarhausen, Germanio; telefono + fakso +49.(0)6203.2765.

---

**La jara membreca kotizo** estas 400 belgaj frankoj, 20 nederlandaj guldenoj, 20 germanaj markoj aŭ 10 usonaj dolaroj. Dumviva membreco akireblas pere de unufoja egalvalora pago de la 20-obla membreca kotizo.

**Kontoj**: Ĉe UEA kaj FEL, kodo ikef-c, kaj belga poŝtĉekkonto 000-1592629-83.

**Perantoj**:

*Cinio*: S-ro **WANG Tianyi**, Xi'an Esperanto-Asocio, Xiyinglu 74 hao,
CN-710054 Xi'an

*Francio*: S-ro François-Xavier **GILBERT**, F-55000 Longeville en Barrois
(CCP 1275-89 L Nancy)

*Germanio*: S-ro Franz Josef **BRAUN**, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl 16
(Volksbank Bühl, n-ro 713120, BLZ 66291400)

*Hispanio*: S-ro Pedro Antonio **MACANAS VALVERDE**, Av. Libertad, 6-2,
E-30009 Murcia (Banco Central, filio 0049-2518, Asoc. Grupo Esperantista "Ricardo Coderníu", n-ro 002-672-1-0027; Kotizo: 1.800 ptas.)

*Hungario*: D-ro István **GETHER**, Palóc u. I, H-1135 Budapest XIII

*Italio*: D-ro Marco **PICASSO**, via de Gasperi 7, I-20057 Vedano al Lambro

*Japanio*: S-ro **YAMASAKI** Seikô, J-185 Tôkyô, Kokubunzi,
Higasi Koigakubo 3-18-12 (pĝk. n-ro Tôkyô 6-253232, kotizo 1400 enoj)

*Pollando*: S-ro Maciej **PIEGAT**, ul. Dantego 1-B/48, PL-01-914 Warszawa

*Jugoslavio*: S-ro Sotir **TALESKI**, ul. 'Oslo' br. 12, YU-91000 Skopje

*Togolando*: S-ro Gbeglo **KOFFI**, B.P. 13169, Nyékonakpoé, Lomé

**Anconcita aranĝo en Ĉinio**

La 4a Internacia Akademia Konferenco pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto, kun komerca-negoca-kunsido, okazos je 10-17 julio 1994. Informoj: Prof. SHEN Chenru (IKEF 74).

**Ĉina filio de IKEF ?**

Prof. Dai Liming anoncis ke li deziras krei ĉinan filion de IKEF. Li opinias ke tia filio alportos multajn avantaĝojn por ĉinaj komercistoj-esperantistoj. Li promesis sendi detalojn pri lia projekto, sed je redaktofino (meze de septembro) tiuj informoj ne jam alvenis. Ĉinaj membroj dezirantaj havi rapide la informojn rekte kontaktu la iniciatinton je: Huasheng Group Co. Huada Corporation, 519030 Wanzai, Zhuhai, Guangdong, fakso (0756) 822421.

"Vojoj kunligas landojn, Esperanto - la popolojn !"

Nia membro Bajáki Imre klopodas kolekti 100 tradukojn de la supra slogano; meze de aŭgusto li jam havis 28.
Per tiuj tradukoj li produktos T-ĉemizoj kun (principe) po 4 tradukoj, i.a. Esperanto (laŭ deziro de la mendinto).
Unu ekzemplero de baza tipo kostas 5 USD; ekde 100 ekzempleroj eblas produkti kun teksto laŭ deziro de la mendinto, kompreneble je pli avantaĝa prezo. Informoj: SORTIMENTO, Pf. 138, H-6100 KISKUNFELEGYHAZA, Hungario.
Ankaŭ produkteblas gluaĵoj kaj bele faritaj nomkartoj.

## **Komercaj petoj kaj proponoj**

Bulgario

Firmao "Detenina 12" komercas per virina konfekcio, lanaĵoj, mantrikaĵoj. Adr.: Maria Goranova, "Tolstoj" bl. 48 - ap. 68, BG-1220 SOFIO, Bulgario.

Ĉeĥio

Ofertas: liberajn radojn kaj fiksajn ŝargojn por bicikloj. Ĉiaspeca importo/eksporto. Kontakta lingvo Esperanto. S-ro Jindra OPRŠÂL, Loučná n./D.74, CZ-788 11; fakso 0042 0649/942 52

Maŝinaj komponentaj diversaj - eŭropa kvalito - ĉio laŭ desegnaĵoj/dokumentado de kliento. PhDr. Břetislav Nevrlý, ARCO, Jana Švermy 1, CS-772 00 OLOMOUC. Telefono 291 71.

Ĉinio

Vid-telefono estas nia ĉefa produkto. Ni serĉas kunlaborantojn por grandigi la entreprenon kaj starigi internacian vendoreton. Prof. Dai Liming, Huasheng Group Co, Huada Corp. CN-519030 WANZAI, Zhuhai, Guangdong. Fakso (0756) 822421 kaj 821541.

Hispanio

Reciklitan paperon k.s. (ekz. kovertojn) ni volas importi precipe el EK-landoj. Sendu katalogojn kaj ofertojn al: IDEXSA, Jaime Balmes 8, E-41007 SEVILLA

Litovio

Firmao JURTA, Antanas RAMONAS, P.O. Box 15, LT-5030 KEDAINIAI, okupiĝas pri gasaj ekipaĵoj. Oni deziras aĉeti gaskalkulilojn (tipo G 2,5) de fabrikantoj SCHLUMBERGER aŭ MAGNIOL. Telefono +370 57 50753, fakso 51964.

Komerco podetala kaj pogranda; konstruado. "UTESTA" a.k., Ĝenerala Direktoro: Kestutis PETKEVIĈIUS, Taŭragnu 54, UTENA, fakso (037) 039-69275.

Madagaskaro

SINCEN (Société Internationale de Commerce et d'Entreprise - Internacia Societo pri Komerco kaj Entrepreno) eksportas:

lokajn sekajn grajnojn (terkapo, fazeolo, lento, pipro...), lignaĵojn (palisandro, rozarbo...), marfruktojn, minajn produktojn (juvelŝtonoj, kvarco...); importas konstrumaterialojn kaj sanitarojn ekipaĵojn. Kontaktu: SINCEN, s-ro RABEVAZAHA Désiré, Dép. Espéranto, B.P. 3171, ANTANANARIVE.

Pollando

Serĉas kontaktojn kun filatel-komercistoj kaj -butikistoj havantaj intereson pri aĉeto-vendo.
Maria Smigiel, ul. Bronikowskiego 3m2, PL-85426 Bydgoszcz

Ruslando

Adresaron de Esperanto-uzantaj firmaoj el eks-SU kompilas s-ro Mikaelo Ĉertilov, "Esperanto Inform", Pf. 111, Moskva-Odincovo-6, RU-143000.

Slovakio

Esperanto-Centro de Slovakia Esperanto-Asocio transformiĝis en komerca kompanio. Ĝi interesiĝas pri ĉiuspecaj komercaj kaj turismaj proponoj. Adreso: SEA, Sobotske nám. 6, 058 01 POPRAD, Slovakio, tel. 092/32419.

Uzbekistano

Komercaj vojaĝoj kaj ekspozicioj, vendo de diversaj varoj, perado de famaj lokaj artistoj. "KULTURA", 148 Mirzo Ulugbek Str., UZ-703048 SAMARKAND; telekso 116544 sagat su, telefonoj +7(3662) 21-36-90 kaj 21-41-04.

**Raportoj pri la Universala Kongreso en Valencio**

Protokolo de la ĝenerala kunveno de IKEF (93.07.26)

Ĉeestis nur du estraranoj, Rotsaert kaj Yamasaki, kaj revizoro Polerani. Prezidis Rotsaert kaj protokolis Yamasaki. Kontribuis artikolon al kongresa kuriero Polerani.

1. La prezidanto deklaris malfermon kaj legis leteron de la IKEF-prezidanto Braun, bedaŭrantan lian foreston.

2. La prezidanto petis malŝarĝon de la estraro, kion la ĉeestantoj donis laŭ la sekva vico:

(a) Aprobo de la financa raporto, aperinta en numero 40 de la organo. La saldo de la lastjara spezokonto estis profita, daŭrigante ĉiujaran tendencon, ĉefe per donacoj.

(b) La membronombro multiĝis ĝis 114.

(c) La malfruiĝo de *La Merkato* estis forigita.

(ĉ) Terminara laboro praktike ĉesis post eksiĝo de Wiersch kiel kunordiganto. Vendiĝas la *ICC-vortaro* kaj la *EK-terminaro* (Economie-Finance-Monnaie).

(d) Verka agado de membroj daŭras. Rotsaert nun estas ekonomia redaktoro de *MONATO*.

(e) En la ĉi-jara UK ne okazos vizitoj al lokaj firmaoj. Ni esperas fari tion en Seulo.

(f) La kontrakto kun *monda merkato* pri komercaj petoj estis renovigita. La membroj ricevas la gazeton.

3. Reelekto de la estaranoj kies mandato finiĝas: ĉiuj rekandidatiĝas kaj estis reelektitaj unuanime.

4. Liberaj diskutoj pri apliko de Esperanto; inter kiuj:

(a) Identecŝildaro estas distribuita al la membroj.
Iuj ne estas kontentaj pri la titolo, sed mankas pli bona. Iu ajn kiu havas bonan ideon bonvolu proponi.

(b) Shen Chenru: Antaŭ la Seula UK okazos en Pekino ekspozicio, kiun li volas sukcesigi per kunlaboro de ĉinaj kaj eksterlandaj esperantistoj. Oni sukcesis en

Belgio; tion li volas ripeti.

(c) Al demandoj pri la E-versio de Economie-Finance-Monnaie, Cwik: ĝi estis prezentita al EK-instancoj, kies reago estas negativa (ĉu planlingvo povas kontribui ?...)
Ĉeestantoj proponis ke oni kunlaboru kun Claude Piron, kiu scias manovri kun EK-instancoj, ke oni diskutigu en fakkunsido de la Eŭropa Esperanto-Unio, ke oni alproksimiĝu al la eŭropa parlamento krom al la Komisiono.

(d) Valente: fingremontris kiel obstaklon en la orienta-okcidenta komerco la valutomankon kaj la neprofesiuleco de la orientanoj kaj emfazis gravecon de staĝoj.
Witdoeckt: konsentis kaj donis ekzemplojn de malkonkretaj komercaj proponoj el oriento.

YAMASAKI Seikô

Kunvenoj de aliaj fakgrupoj

Ĉar neniu el la pluraj grupoj de **komputilistoj** antaŭvidis iun kunvenon dum la UK, Thomas Goldman lastmomente mem organizis kunvenon. Estis ĉefe priparolataj du temoj: la uzo de elektronikaj retoj por pli efika komunikado, kaj la esperantaj supersignoj. Por tiu lasta problemo L. Mee prezentis senpagan tekstprilaboran programeton. Mi nur povis ĉeesti parton de la kunveno; verŝajne en la revuo *Eventoj* intertempe aperis pli detala artikolo.
Kvankam ĉeestis sufiĉe granda publiko, antaŭvideblas ke **ISAE** (sciencistoj) pereos pro manko de gvidaj personoj.

**IKEO** (kooperativistoj) estis nur reprezentita de sia brita vicprezidanto kaj verŝajne ne sukcesos pluekzisti pro perdo de siaj orienteŭropaj kunlaborantoj.

**EJA** (juristoj), kies prezidanto estas Ian Jackson, pro tempomanko ĉe la gvidantoj ne sukcesis vigle agadi. Oni nun klopodos almenaŭ eldoni modestan revuon. Pluraj membroj laboris individue pri tradukado kaj terminologio.

**TEC** (Terminologia Centro de UEA) dum sia ekzisto nur spertis malfacilaĵojn: en la momento kiam la centra oficejo ekfunkciis, komenciĝis la milito en Jugoslavio; ŝajne mankas apogo de la Akademio de Esperanto (jes estas subteno de individuaj akademianoj); UEA hezitas por daŭrigi sian

financan helpon; por eksteruloj la ekzisto de Pekoteko (Eichholz) eble donas la impreson ke du sistemoj konkurencas (kvankam ili fakte kompletigas sin)... Sinjoroj Blanke kaj Bormann akceptis la taskon serĉi vojon por eliri la problemojn.

Al la kunveno de legantoj de **Monato** venis sufiĉe granda publiko. Komence de 1992 anstataŭ unu ĉefredaktoro venis pluraj "partredaktoroj" kaj unu "teknika redaktoro". Fine de 1992, post analizo de la rezultoj de enketo inter la legantoj, kelkaj rubrikoj estis adaptitaj. Pri tiuj intervenoj venis iom la laŭdo kaj iom da kritiko.
Pri *Monato* nun komplete respondecas Flandra Esperanto-Ligo. Por tiu asocio la revuo donas foje profiton, foje perdon, sed entute estas financa ekvilibro. Kompreneble, pli da enspezoj (el pli granda abonantaro kaj el pli da komercaj anoncoj) donus eblecon por plibonigi la revuon.

RR

Honoraj membroj de UEA

Inter la novaj honoraj membroj de UEA troviĝas tri IKEF-anoj: Bormann, Maertens kaj Symoens. Gratulon !

**Eldono de fakaj libroj en Esperanto**

Dum la kongreso mi havis plurajn kontaktojn kun s-roj Giuseppe Valente (EKA, Trieste) kaj Harald Schicke (eldonisto, Im Heidewinkel 45, D-21271 Asendorf) pri ebla eldono de libroj por klerigado de komercistoj. S-ro Valente sugestas krei serion de etaj, simple eldonitaj libroj pri diversaj temoj. S-ro Schicke (kies ĉefa fako estas medecino) havas intereson pri aliaj temoj, sed ĝis nun ne estas manuskriptoj.

RR

## Pri miraklaj manaĝeroj...

Jam plurajn monatojn daŭras kverelado inter germanaj aŭtomobilfabrikantoj Opel (filio de usona General Motors) kaj Volkswagen. Volkswagen-estro Piëch sukcesis dungi General Motors-reorganizinto López. Estas multaj indikoj ke López ne nur kunportis sian profesiajn kapablojn al Volkswagen, sed ankaŭ amason da konfidencaj Opel-dokumentoj.

En germana revuo Der Spiegel aperis jena letero de leganto pri la fenomeno de miraklaj administrantoj, kiuj sanigu kriplajn entreprenojn. Mi libere tradukis el la germana kaj iom mallongigis.

RR

Por ĉiu, kiu jam havas iom da profesia sperto, estas konata okazaĵo. Iun tagon subite aperas iu miraklulo en la entrepreno kaj okazigas stereotipan kunvenaron. Unue li estas prezentata al la publiko en grandioze anoncita kunveno. Sekvas tondra parolado de la novulo; li ofte uzas multajn amerikanismojn, por ke eĉ stultulo komprenu ke li studis en Usono. En la postaj malgrandaj rondoj ŝablona frazo estas "se ne plaĉas al vi, vi ja povas foriri". Intertempe la savonto kreas korteganaron de konfidenculoj, kiuj samtempe kun li alvenis. (...)

Por fari ekzemplon, li serĉas ŝatatan, elstaran kolegon kaj ĉikanas lin tiom, ke li forlasas la entreprenon. En ĉiuj niveloj de la entrepreno ekregas rezignacio. Eĉ la plej bonaj kaj diligentaj kunlaborantoj mense eksiĝas kaj nur plenumas instrukciojn. (...) La paneoj oftiĝas. Subite la estraro de la firmao mirinde ofte asertas ke la homo havas sian plenan konfidon. (...) Fine, seka komuniko en la mesaĝtabulo sciigas ke "kun reciproka interkonsento, oni bla, bla, bla...".

Estas ĉiutaga okazaĵo en la ekonomio. Kostis al la firmao, laŭ ĝia grandeco, dekmilojn, centmilojn aŭ eĉ milionojn. Sed la vera tragedio estas ke la entrepreno efektive urĝe bezonis homon por forigi sklerozitajn strukturojn kaj blovigi novan venton. Rapida forigo de la miraklulo estus konfeso de spektakla kaj multekosta fidecido.

## Donacoj

La kasisto dankas pro anonima donaco de 20.497 BEF.

## Novaj aliĝoj

175. S-ro Christian PAPENMEIER, Obere Hauptstr. 104, D-09376 OELSNITZ, Germanio, telefono 00 49 161 5302820, fakso 00 49 371 34993 [filio en Ĉeĥio: Horni 9, CZ-586 04 JIHLAVA]. Specialiĝas en kontaktoj kun iama DDR (i.a. fabrikantoj de konstrumaterialoj) kaj kun orienteŭropaj landoj.

176. S-ro Thanas KARAJANI - Firmao ALBATRAG-93, RR. Punëtorët e Rilindjes, P.2 A.63, TIRANË, Albanio,

177. S-ro Gilbert LEDON, rua Maria Aparecida Anacleto 94 no. 111-A, BR-04809-120 SAO PAULO SP, Brazilo

nova dumviva membro:

178. S-ro Shang JUNYI, Chengde-a Amway-da Kompanio,
P.O. Kesto 88, CN-067000 CHENGDE, HEBEI, Ĉinio,
fakso 0086-(0)314-227004

179. S-ro Kestutis PETKEVIĈIUS - "UTESTA" a.k., Taŭragnu 54, LT- UTENA, Litovio

## Adresŝanĝoj

50. Michael CWIK, Sijsleslaan 22, B-3080 TERVUREN-MOORSEL (telefono + fakso 00-32-2-767.40.21)
64. Maria SROGOSZ, prof. adreso: "SPUH" (librotenado-impostoj), Jaracza 72, ŁÓDŽ, tel. 042-789-712, telekso 886672
168. João Otávio VEIGA RODRIGUES, Rua Joaquim Camilo Tavares, n° 199, Campos Elíseos, BR-37018-320 VARGINHA (MG)